



1910 J.

7 JARO

5/18 de Decembro

ОТКРЫТА ПОДПИСКА НА 1911 Г.  
 Литературно-пропаганднаго двухнедѣльнаго журнала  
**Кавказскій Эсперантиетъ**  
 который будетъ выходить 1-го и 16-го каждаго мѣсяца.  
**годовая плата і р. 50 к.**

*Подписчики 1910 г. платили только 2 р. Подписчики платили на отрывных листках уроки языка „Эсперанто“.*

*Адрес: Тифлисъ, типографія „Эсперанто“. Айну Теръ - Аствадатурицу  
 RUSSIENSKE T. RUSKENSOPROFESSORINEN 1911 №.*

### კიკცასესაჲ სუფერუსსიჲ

გ რ უ კ ა ს ე ს უ ფ ე რ უ ს ს ი ჲ უ კ ა ს ე ს უ ფ ე რ უ ს ს ი ჲ  
 არე კონსორციე კარე 1, თბილისი, თბილ 1-ქს ს 16-ქს ჯანაშიაძის ბაღებში 1 რ. 50 ლ.  
 ზაფხულს ჩქიჩქი, ნაკარან ძეგლებშია. ზაქ სტე-მთავრობისაგან  
 გაიხსნა ხელის მოწვერა 1911 წ.

### კავკასიის ესპერანტისტნი

სალიტერატურო-საპროპაგანდო ორკვირიულ ჟურნალზედ.  
 რომელიც იანვრიდან გამოვა ყოველ თვის 1 და 16 რიცხვებში კონსორციად.  
**წლიური ფასი 1 მ. და 50 კ.**

1910 წ. ხელის მოწვერა გდაიხლიან მხოლოდ 1 მანეთს.  
 ადრესი: თბილისი, სტაჰვა „ესპერანტო“, ჰაიკ ტერ-სტეფანატრიანცს.  
**Редакция открыта ежедневно отъ 5-7 ч. вечера.**

# „La Rememoro“.

(El infana vivo)

S. Aragvispireli.

(Sio Dedabriŝvili)

## I

En unu dimanĉa mateno dum dormo mi ekafidis fajfon. Rapide mi desaltis de litaĵo kaj vestita sole per ĉemizo elkuris eksteren. Mi ankaŭ ekfajfis. Oni fajfis ankoraŭ kaj poste oni neripetis fajfadon. Mi eniris en domon por min vesti.

Mi, Soso, Ŝakro kaj Giglo reciproke donis promeson iri ĉasi koturnojn. Kiam mia patrino eksciadis, ke mi intencas iri en kampon, ŝi ne forlasadis min de si kaj ĉiam penis iel restigi min en hejmo. Jen por tio ni havis fajfon kiel signalon de alvoko. La patrino ordinare tion ne divenis kaj mi libere eliradis ekster la vilaĝon, kie atendis mian mian kamaradojn.

Mi ligis rimenojn de sandalo, kiam en domon eniris panjo. Ŝin mirigis mia tiel frua neordinara levigo kaj ŝi diris.

— Kiel ĝi okazis, fileto, ke ci frue vekigis!? Ĉu estis iu?

— Kiu devis esti, respondis mi mallevinte kapon. Mi rimarkis, ke mi rugiĝis, kaj tial mi ne levis kapon supren.

— Versajne ci intencas ien iri kaj tial vi vestas vin tiel ekscite, — ne lasis mian panjo.

— Nu kien mi iros? rediris mi kaj rugiĝis, ankoraŭ pli. Por malgranda tempo falis la silento. Mia patrino pensis pri io. Fine ŝi aliris al mi proksimen kaj ekparolis:

— Mia filo, ne disŝiru mian koron!.. Ne estas por ci bone imiti al aliaj. Kian utilon ci havas, ke ci vagas kun Giglo kaj Ŝakro? Iliaj gepatroj havas krom ili aliajn infanojn; do vin mi havas so-

lufanon! Se io okazos kun ci, mi ja ankaŭ mortigos min, kiel mi tiam vivu!?

Mi kapklininte kaj kun pendantaj lipoj aŭskultis ŝin. Duone ĉirkaŭvolvita sur alia piedo, rimeno restis ne ligita.

— Ne decas al tiel grandaj knaboj eliradi en kampon! Hieraŭ rabia hundo apenaŭ ne mortmordis Davidon de Ahsabadze...

Panjo en tiu momento ekrimarkis la katon, kiu alŝteliris al melkujo kaj lekis lakton.

— Aĉa, aĉa!.. He vi malnoblulo!.. kriis panjo al kato kaj sin puŝis al melkujo. La kato malsuprensaltis kaj elkuris eksteren.

— Timante tiun ĉi malnoblulon, nenion mi povas lasi nekovrite! diris ŝi, kovris melkujon per taso, poste turnis sin al mi.

— Sandro! estu ĉi tie, observu ĉi tie. Mi forpelos bovinon en paŝtejon, tuj revenos kaj ni iru en vinbergardenon. Kiam panjo eliris el domo, mi sidis en sama pozo. Mi rememoris ke ni estis irontaj por ĉasi, sed ŝiaj paroloj iel pensigis min kaj malgajigis kaj ĉe rememoro de l' rabia hundo mi eksentis en korpo fortegan ekstremon. Antaŭ unu semajno mia panjo rakontis al mi, ke rabia hundo mordis unu homon kaj li rabiĝis: „en lia ventro, ŝi diris, naskiĝis hundidoj, kiuj tramordetis la tutan internon“.

Tiuj ĉi vortoj entranciĝis en mian koron, nun mi tion ĉi rememoris kaj ne sciis, ĉu resti hejme aŭ iri ĉasi koturnojn. Fine la deziro de ĉasado tamen superfortis min. Rapide mi ligis sandalan rimenon, enrampis sub kuŝejon kaj elprenis mian kantobastonon kun pintigitaj branĉetoj.

Post iom da tempo mi kaj mian kamaradoj interparolante marŝis inter plektobariloj al la kampoj. Plie ni parolis pri kaptobastonoj. Ĉiu laŭdis la

sian kaj sian lertecon jetadi ilin. Gisera (la hundo) saltadis antaŭen; ĝi iris malproksime saltante kaj ĝojante. Kiam ĝi tre malproksimiĝadis, subite haltadis, ekbojadis, returnadis sin kaj, ĉiam saltante reiradis al ni. Ĉirkaŭlarinte ĉiun el ni aparte, ĝi karesadis kaj ree direktadis sin antaŭen.

La suno ankaŭ montris sin el sub la montpinto,

— Kamaradoj!—diris al ni Giglo: ni eliris tiel frue—kion ni faros; ĝis kiam ne estos varmege ni ja ne povos ĉasi!

—Nu jes, kion ni faros en la kampo! —jesigis Soso.

—Dum venos varmege ni ludu sur bordetoj de l'fonto, konsilis Sakro. Ĉiuj konsentis kun li kaj foriris saltante, sed nin haltigis matura morusarbo staranta apud plektobarilo.

— Rigardu tion, kamaradoj, kiel ĝi maturas, ah!—eldiris Soso,—ni manĝu.

— Vere, kiel ĝi maturas! Prefere ni manĝu tion ĉi, ol ludu, miaj sinjoroj!? diris Sakro.

— Estas malpermeso, mi diris, se la kampistoj kaptos nin, ili devigos buĉi<sup>ti</sup> bovinon.

Tiuj ĉi vortoj nin ĉiujn detenis kaj malĝojigis. La matura morusarbo tamen allogis al si. Ni jam ne volis foriri. La tento superortis nin, Sakro prenis ŝtonon kaj suprenjetis al la branĉaro. Kelke da beroj ekfalas ekster la plektobarilon.

Ni nin jetis al ili kiel akcipitroj kaj rapide kolektis.

— Uf, uf, kiel dolĉaj ili estas! kun smacado de lipoj kaj kun plezuro diris ĉiuj.

— La avina morusarbo ankaŭ tre maturas,—diris al ni Giglo,—ni iru tien, se eĉ venos la kampistoj, nenion al ni diros. „Ne malpermesu al Giglo“ diris avino al ili. La vinbergardeno de Gigla avino trovigis ĉi apude Mi kun ĝojo

saltis trans plektobarilon kaj ni direktis nin tien. Gisera ankaŭ sekvis nin. (Finota).

Kun la permeso de l'aŭtaro el la lingvo kartvela tradukis.

G. BAKRADZE.



## Hirundo

(! e Dudohjan)

—

Hirundo, hirundo.  
Printempa belbirdo  
Ho, kien forflugas  
Vi tiel rapide.

Ah, flugu, birdeto,  
Hejm' mian Astarak  
Kaj plektu nesteton  
Sub hejna tegmento.

Mi tie patreton  
Ja havas funebbran,  
Li sian fileton  
Atendas fortfebre.

Saluton transdonu  
Vi l' patron vidinte.  
Kaj diru—li ploru  
Pri fil' malfeliĉa.

Rakontu ke l' koro  
Sen ajna distr' estas;  
Ke ploro—priploro  
Viv' mian mordetas.

Dum tag' por mi l' suno  
Malluma nun estas;  
Dum nokto senluna  
Sendorme mi restas.

Ke eĉ ne florinte  
 Mi velkis en fremdo:  
 Mi--floró floriinda  
 Senigis de l' tero...  
 Do flugu, hirundo.  
 Forflugu senbare  
 Al hejmo aminda,  
 Al mia Aŝtarak!

Melodiigis Srinid



## L A A M K A N T O.

(Persa legendo)

Ruĝvesta rozarbusto trankvile svingigis en la arbplena ĝardeno, aŭdigis la trilo de frumatena zefiro, horizonto komencis flugri -- la pluveman, malĝojan nokton anstataŭis agrabla, vivplena mateno.

Bonan matenon, Rozarbusto, diris unu virino alproksimiĝante al arbusto, ĉu vi memoras, kiam pasintjara printempe vi ĝajigis per viaj rozoj mian infaneton? ĉu ne forgesis vi lian ploron, kiu kaŭzis viaj akraj doruoj? O, sendube, vi forgesis neniu memoras mian infaneton krom mi, sole mi malfeliĉa patrino nokte kaj tage, ĉiunminute memoras, rememoras lin, sole la patrino koro ne povas forgesi lin.

Blovis venteto, rozarbusto svingigis -- Jes? Vi komprenas nun? Sed ne, vi ŝajnigas. Vi ne povas memori lin, kiam eĉ lia patro forgesis jam.

Ne malproksime de rozarbusto la floraro de la jasmeno rakontis al siaj najbaroj pri la senkora edzo de la filperdinta patrino, kiu -- forgesinte sian frumortintan infanon -- ĝojis kun dua edzino.

-- Vi estas tre bela, mia Rozarbusto estas belaj ankaŭ vir ĉirkafantaj multtekoloraj floroj: grandaj kaj málgrandaj arboj, de malproksime vidataj montoj, la ĉiela bluo, aperanta suno, unuvorte, ĉio estas bela kaj pompa. Ĝia naturo mem estas beleco, sed bedaŭrinde, ne povas min ravi la bela naturo.

La rozarbusto svingis la kapeton: -- O, vi estas tedema, vi eĉ deziras respondi, diris la malfeliĉa virino kaj sin turnis de malbonvola arbeto.

Ekstere zefiro daŭrigis kanteti, la rozarbusto kaj jasmeno interparolis, la suno, kiel nova fianĉino, surdpaŝe eliris de post la montoj, malfeliĉa patrino enabismuĝinta en senfiradan zorgmaron sentis, ke ŝi estas sola, sola sur la tuta terglobo.

Ĉesis zefira voĉo, rozarbeto kaj jasmeno ankaŭ ĉesis paroli, la floroj pli levis siajn diverskolorajn kapetojn kaj la suno unuan fojon dum sia ĉirkaŭ -- monda vojaĝo haltis malantaŭ la horizonto. -- Ĉiuj, aŭdis la kantadon, kiu ĉarmis eĉ senanimajn ŝtonojn.

La filperdinta patrino minute forgesis sian malfeliĉecon, perditan intaŭton, senaman edzon kaj ĝojnin\*. Ĝi sin ektrovis en mondo, kie regas eterna feliĉo, kie ridi kaj plori, ĝojo kaj malĝojo kune iĝas senfina, dezirema harmonio.

-- Kiu kantas? kaj ĉio estas la kantado? -- Ĝi -- ne sintras, al miaj konataj kantoj -- pensis la virino kaj ŝajnis al ŝi, ke la kantisto estas en ĉielo, apud sino, sidinta sur nuboj, ŝajnis al ŝi, ke kantiston akompanas la ĉielaj anĝeloj.

-- Sed ne, la kanto aŭdiĝas de proksime -- diris ŝi kaj servoĉe, sitente, eniris najbaran ĝardenon.

Veru, la kantisto sin trovis en ĉi

\* En persujo la edzinoj de sama edzo rilate unu al alia nomiĝas ĝojnin.

ĝardeno; sub grandega arbo, sur verdaj herbajoj.

La koro de la orienta belulino pleniĝis de nekonata sento. Ŝi edziniĝis sen amo al sia edzo, ŝi amis la infancon kaj kruela fato fortiris lin por eterne.

La belulino sentis, ke nun ŝi ne estas sola.

La kantisto rimarkis belulinon kaj, kiel timema najtingalo, ĉesigis la kantaĵon.

La rozarbeta rekomencis ŝvingiĝi, zefiro daŭrigis kanti; la sumo redaŭrigis sian vojon, kaj... la belulino, ne rimarkeble, sin troviĝis en brakoj de la kantisto; sed ŝi la felico ne daŭris longo-aŭdiĝis piedvoĉo kaj kantisto foriris.

Atendu! mi venas kun vi, atendu! ekkriis la amebria virino, sed la kantisto ne atendis ŝin, li timis perdi en la amo de la bela virino sian ĉarman kantaĵon.

Diru, kion vi kantis, ekkriis ŝi malespere.

-Daŝti\*... aŭdiĝis inter arbaj folioj kaj la kantisto malaperis?

Oni rakontas, ke ĝis hodiaŭ la kantisto forkuras tirante la, junan orientan belulinon, kiel magnetitan feron. La virino petegas rekapti Daŝti-n, sed la kantisto daŭrigas senfinan vojon, ne atentante la virinon.

Oni rakontas ankaŭ, ke neniu kantas en Iran ĝis hodiaŭ Daŝti-n tiel helvoĉe, tiel ĉarme, kiel unufoje la amanto de la filperdiinta orientbelulino.

VASARO.

Tabriz (Persujo).

## LA MATENO DE AFERISTO

(De Gogol)

III

Samaj kaj Ŝrejder (rigardas el pordo).

**Johano Petroviĉ.** (Eniru, eniru: nenion, bonvolu iri tien ĉi: kio ĝi estas por raporti?)

**Ŝrejder.** Por subskribi. Tie ĉi estas sciigo en palato kaj raportaĵo al administranto.

**Johano Petroviĉ.** (legas). „Al sinjoro administranto...“ Kion tio ĉi signifas la marĝenoj de randoj de estas ne glataj. Kial? Ĉu vi scias, ke oni povas vin malliberigi? (Direktas profundpensan rigardon sur lin papero.

**Ŝrejder.** Mi parolis pri tio al Johano Johanoviĉ: li diris al mi, ke ministro ne rigardos ne estos rigardanto tiun bagatelon.

**Johano Petroviĉ.** Bagatelon! Johano Johanoviĉ povas tiel bone paroli. Mi men same opiniis: ministro, eble ne atentos... Nu, subite li deziros?

**Ŝrejder.** Oni povas reskribi; nur estos malfrue. Sed ĉar vi bonvolis mem diri, ke ministro ne atentos...

**Johano Petroviĉ.** Jes, ĉi ĉio estas vero. Mi kun vi tute konsentas: li ne okupiĝos pri tiuj bagateloj. Nu, kaj se eble li deziros: donu al mi, mi rigardu ĉu estas granda loko por marĝenoj?

**Ŝrejder.** Se estas tiel, mi tuj reskribos.

**Johano Petroviĉ.** Jen vi vidas „se estas tiel“: Mi ja kun vi parolas kaj klarigas, ĉar vi edukigis en universitato. Kun alia persono mi ne parolus.

**Ŝrejder.** Mi kuragiis nur, ĉar sinjoro ministro...

**Johano Petroviĉ.** Permesu, permesu! Tio estas tute vere: mi tute ne disputas kun vi. Jes ministro tion neniam rigardos kaj ec ne memoros pri tio. Nu kaj se subite... Kion vi diros tiam?

**Ŝrejder.** Mi reskribos. (Foriras).

\* Daŝti estas unu el la plej famaj persaj kantoj. Kiam oni kantas ĝis niaj tempoj.

## IV

**Johano Petroviĉ.** (levante siajn sul-trojn turnas sin al Aleksandro Johano-  
viĉ). Ankoraŭ vento blovas en lia kapo!  
Bonorda junulo, antaŭnelonge eli-  
ris el universitato, sed jen tie ĉi (mon-  
trante frunton) ne estas. Vi ne povas  
al vi prezenti estimata Aleksandro  
Johanoviĉ, kiam mi laboris por ĉi ĉion  
ordigi; se vi rigardus en kia stato  
estis mia nuna loko, kiam mi akceptis  
ĝin! Imagu ke neniŭ kancelaria oficisto  
povis orde skribi literojn unu transi-  
gas la literon „K“ sur alian linion, alia  
sur unu linio skribas m—kaj sur la dua  
linio: oŝto. Unuvorte diri: tio estis te-  
rure! Babela turkonstruado. Nun vi pre-  
nu paperon: estas bele! bone! animo  
ĝojas, spirito triumfas. Sed ordo?—ordo  
estas ĉie.

**Aleksandro Johanoviĉ.** Sekve oni po-  
vas diri, ke rangojn vi ricevis per ŝvi-  
to kaj sango.

**Johano Petroviĉ.** (ekĝeminte). Efe-  
ktive, per ŝvito kaj sango. Kion oni po-  
vas fari, mi ja havas tielan karakteron  
Kio mi nun ostus, se mi mem klopodus,  
Mi ne havus sur mia brusto liberlokon  
por ordenoj. Sed kion fari, mi ne po-  
vas! Flanke mi aludos ofte sed rekte  
peti ion senpere por mi mem... ne, ĝi  
ne estas mia afero! Aliaj ĝajnas sen-  
ĉese. Mi do havas mia tian karakteron:  
ĉiel mi povas malaltiĝi, sed malnoblon  
mi neniam povas fari! (Ekĝeminte). Mi  
volus nur unu solan... ke mi ricevu  
almenaŭ ordeneton sur mian kolon.  
Ne tial, ke tio min tro amuzas, sed  
sole, por ke oni vidu nur la atenton  
de la estraro. Mi vin petas, grandani-  
ma Aleksandro Johanoviĉ, se estos bo-  
na okazo, kompreneble interalie, aludi  
al lia grandekscelenco, ke Barsukov  
en sia kancelario havas tian ordon,

kian vi malofte ie vidis, aŭ ion simi-  
lan.

**Aleksandro Joanoviĉ.** Kun granda  
plezuro, se estos okazo.

## V

Samaj kaj Katerina Aleksandrovna  
(la edzino de Johano Petroviĉ).

**Katerina Aleksandrovna.** (vidinte  
Aleksandron Johanoviĉ). A! Alnk-san-  
dro Johanoviĉ; Mia Dio, kiel longe mi  
ne vidis vin. Vi forgesis min! Kiel far-  
tas Natalja Fominiŝna!

**Aleksandro Johanoviĉ.** Dank' al Dio,  
cetere, antaŭ unu semajno preŝkaŭ ŝi  
malsaniĝis.

**Katerina Aleksandrovna.** E!

**Aleksandro Johanoviĉ.** En la brusto  
sub ripeto fariĝis koliko kaj tremado.  
Kuracisto uzigis purigrimedon kaj  
kataplasmon de kamomilo kaj salamo-  
niako.

**Katerina Aleksandrovna.** Kial vi ne  
provis rimedon homeopatian?

**Johano Petroviĉ.** Mirinde, evelte,  
kiam mi pensas, kiel progresas la ci-  
vilizacio. Jen vi parolas, Katerina A-  
leksandrovna, pri meopatio. Antaŭ ne  
longe mi estis ĉe prezentado. Kion vi  
pensus! Knabaĉo, de aĝo, kiel diri al  
vi? jen tia (montras per mano) li havus  
tri jarojn ne plie: se vi rigardus, kiel  
li dancas sur plej maldika ŝnurego!  
Mi vin asertas serioze, ke spirito tre-  
mas pro teruro.

**Aleksandro Johanoviĉ.** Tre bone kan-  
tas „Melaso“.

**Johano Petroviĉ.** (grave). Melas? O,  
jes! kun granda sento.

**Aleksandro Johanoviĉ.** Tre bone.

**Johano Petroviĉ.** Ĉu vi rimarkis, ki-  
el ŝi prena slerte jen tion ĉi... turnas si-  
an manon antaŭ la okuloj).

**Aleksandro Johanoviĉ.** Efective (ko-  
rekte) tion ŝi mirinde prenas bone. Ta-  
men baldaŭ estas jam la dua horo.

Johano Petroviĉ. Kien do vi iras, Aleksandro Johanoviĉ!

Aleksandro Johanoviĉ. Tempo jam estas! Mi devas ankoraŭ veturi en tri lokojn ĝis tagmango.

Johano Petroviĉ. Nu, ĝis revido. Kiam ni nin revidos? Cetere mi forgesis, ni ja morgaŭ estos ĉe Lukajano Fedosejeviĉ?

Aleksandro Jehanoviĉ. Nepre! (Li salutas).

Katerina Aleksandrovna. Adiaŭ, Aleksandro Johanoviĉ!

Aleksandro Johanoviĉ. (en lakeĉambro, surmetante pelton). Mi ne toleras personojn de tia speco. Nenion li faras, nur grasiĝas, kaj ŝajnigas, ke li estas kaj tia, kaj ĉi tia, kaj tion li faris, kaj tion korektis—vera virto! Jen li kion ekdeziris! ordenojn! kaj li ja ricevos! Li ricivos, fripono! ricivos! Tiaj personoj atingas ĉiam. Sed mi? mi ja servis kvin jarojn pli ol li, kaj ĝis nun mi ne estis prezentita. Kia malagraba fizionomio! Li delikatiĝis; li tute ne volus, sed por montri la atenton de la estrato. Li eĉ petas, ke mi petu pri li! Nu, vi trovis personon, kiu petos, mia kara! Nu mi faros bonan komplezon al vi, sed vi tamen ordenojn ne ricevos! ne ricevos! ne ricevos! (Jese frapas kelkajn fojojn per pugno sur sian manplaton kaj foriras).

El la rusa lingvo tradukis  
A. Arumov.

### RIMEDO KONTRAŬ GASTOJ.

Al unu doktoro ĉiutage dum la tagmango venadis gastoj. Lia edzino estis nvara, la gastoj tedis ŝin kaj ŝi, por sin liberigi de ili, diris unufoje al sia edzo dum la tagmango, ĉe la ĉesto de kelke da homoj:

--Mia amiko, mi timas, ke la infa-

noj ludos kun la mano de mortinto, kiun vi alportis hieraŭ el la kliniko kaj kaŝis ĝin en la bufedon, kie troviĝas la vazoj; tie en supujo kuŝas la cerboj de droninto, kiujn vi alportis antaŭ tri tagoj... Ha!... apenaŭ mi ne forgesis... la stomako de alkoholulo, kiun oni sendis al vi hodiaŭ, mi metis en la tirkeston de via tablo, kie kuŝas la cigaroj...

Tiu ĉi rimedo kontraŭ la gastoj helpis kaj sekvantan tagon la doktoro kun sia edzino tagmanĝis nur duope.

El la rusa lingvo tradukis.  
E. LITVIŜKO

--Iru ni en la preĝejon!

--Estas kote...

--Nu, tiam ni iru en la drinkejon.

--Bone...sed ni icu apud la plektbarilo

Trad. E. Litviŝko.

### MI VOLAS ESTI PENTRISTO.

„Mi ankaŭ volas esti pentristo“. Tiel diris malgranda Peĉjo, kiam li estis unu fujon ĉe sia onklo pentristo kaj vidis, kiel la onklo-pentras bildon. Peĉjo havis kajeron por pentrado, kraĵonojn, kaj li tuj reveninte hejmen komencis laboron.—Mi pentros portreton de mia ĉevaleto,—decidis Peĉjo. „Staru trankvile“, sin turnis Peĉjo al sia ligna ĉevalo kaj komencis pentri. Tamen, kiom li ne peus, la ĉevalo en la kajero malmulte similis al la vera: ĝi estis kurba, straba, similis pli kamelon, ol ĉevalon.—En ĉio nur la kraĵono estas kulpa,—decidis Peĉjo,—mi petos de mia onklo, ke li donacu al mi siajn kraĵonojn, tiam la portreto estos pli prospera. „Ne en kraĵono estas la afero, klarigis la onklo—sed en la scio: jen vi tamen iel pentris ĉevalon; iu alia eĉ tion ĉi ne povus; sekve vi havas kapablon al pentrado

kaj eĉ eble vi havas grandan talenton. kaj vi iam fariĝos efektiva pentristo. Sed por tio ĉi oni devas multe ekzerci. Kaj ne unu jaron, ne du, sed multe, multe da jaroj: tuj iĝi pentristo ne estas eble. Ĉu ne tedos al vi, Peĉjo, la lernado?

--Onklo, mi volas lerni kaj volas labori, --gaje diris Peĉjo, --ĉar mi volas esti pentristo.

Elnsigis Vasilio Ivanšvili.

## ESPERANTO EN PERSUJO.

Tabriz 18 de Novembro 1910

En la tria numero de la persa ĉiunumona revuo „Behar“ (La printempo) estas presita artikolo pri Esperanto. kies tradukon mi donas al la legantoj de „K. E.“ La apero de tiu-ĉi artikolo estas tre signifa por ni esperantistoj, ĉar ĝi estas la unua en sia speco ne nur en persa, sed eĉ en perslanda gazetaro. Krom tio ĝi sciigas al ni ke inter Teheranaj, ĵurnalistoj estas personoj, kiuj proponas al siaj legantoj atenti Esperanton.

„Esperanto--ni legas en Behar-- estas nomo de la nova lingvo, kiu estas naskita por plifaciligi interparoladon kaj liberigi homojn de bezono lernadi diversajn lingvojn. Esperanto estas la plej facila kaj klara lingvo, ĉar ĝi tute en havas gramatikajn kaj aliajn malfacilecon.

„La aŭtoro de tiu-ĉi lingvo D-ro Zamenhof hodiaŭ en la civiliza mondo estas rigardata kiel unu el mondfaŭmaj personoj. Li de infaneco komencis okupiĝi pri invento de internacia lingvo, celante forigi la malfacilecojn kiujn kaŭzas al homoj la diferenco de lingvoj. Zamenhof estas ruso kaj naskiĝis post tri jaroj de la Krima batalo

un li havas 19 jarojn\*.) Por formadi kaj kolekti vortojn kaj regulojn de tiu ĉi lingvo, de la komenco ĝis nun, li laboras por verki ĉiujn esprimojn.

„Unu tagon Z. diris al unu el siaj amikoj: „Mi ne scias paroli sed povas skribi angle. Mi tradukis unu libron el angla lingvo esperanten, kaj mi senkaŝe diras al Vi, ke dum la verkaĉado de Esperanto mi multe profitis el angla lingvo kaj nun, se vi rigardus esperanton, vi nepre mirus, ĉar ĝi ne havas pli ol 13 reguloj \*\*).

„Decembre de 1878-a, kiam mondo jam sciis pri nova lingvo, Zamenhof kun siaj amikoj verkis jeuan versajon kiam mi tradukas laŭvorte, ne atentante poeziajn formojn“.

Poste estas presita „La Espero“ esperante kaj ĝia persa traduko.

„En la 1887-a--daŭrigas la aŭtoro de la artikolo--Zamenhof eldonis la unuan broŝureton priesperantan, -- „Lingvo Internacia“. Tiam neniu atentis lian skribaĵon, sed li malgraŭ tio uzis tutan sian povon por disvastigi la amatan aferon. La unua persono, kiu akcelis Zamenhofon estis S-ro Gaston Moch.

„Esperanto estas tia facila, ke ĉiu persono povas lerni ĝiajn regulojn en unu horo, la nombro de vortoj ne estas pli ol 2000; dum kvar aŭ kvin semajnoj oni povas legi kaj skribi esperante. Ĝiaj vortradikoj estas prenitaj el greka, latina, germana, rusa, angla franca k. c. lingvoj“.

Poste sekvas klarigoj de espranta gramatiko.

Kvankam la artikolo ne estas sufiĉe plena kaj havas malgrandajn eraraĵojn ni salutas ĝian aperon esperante pri ĝia nepra influo sur pensojn de niaj samlandanoj.

V. SARKISJAN.

\* ) devas esti 51.

\*\* ) 16 reguloj.



## SENCELE SERĈU!

La vera amikeco, ĝi mankas ĝis nun nin;  
Ni nur komencas ami... sed tuj jam estas fin!  
Malmulte ja da homoj amikon trovas bona,  
Ĉar nuna homa koro plej ofte restas stona.

La vera amikeco similas al la or',  
Kaj tial devas ope briladi mia kor',  
Sensanga, plej sindona, per amo neĉesebla,—  
Per faktoj, ne per frazoj, al ĉiu travidebla!

Tre ofte al mi ŝajnis la amikeco trezor'...  
Sed pli regule tio finiĝis kiel flor':  
Ĝi ankaŭ forvelkiĝas kaj perdas sian kronon,  
Kaj amikeco vane tra l'mondo serĉas homon!...

Originale versis  
PETR NOVOPHRADSKY

(Plzen-Bohemujo).

## NE FORPELU ALMOZULOJN.

El antikva Tataŝa libro.

Oni diras, ke en urbo Bagdado\*) loĝis tre riĉa komercisto kiu estis tre avara homò, kaj dum ŝia tuta vivo al neniu li donis almozon. En ĉi tiu sama urbo ankaŭ loĝis unu malriĉa laboristo (Hammalo). Estis malfeliĉaj tempoj kaj laboristo malsatiĝas, tial li decidis almozi. Kaj iris laŭ Dia volo en domon de ĉi tiu komercisto; frapante pordon, li petis malmulte da pano. La edzino de komercisto aŭdiinte la peton de l'almozulo, donis al sia filino malmulte da pano kaj ordonis al ŝi, ke ŝi donu la panon al almozulo. Ŝi foriris kaj donis al la almozulo la panon; li dankis ŝin kaj foriris. Voje li renkontis la patron de la filino, kaj la

patro demandas lin, kin donis al li tian panon, ĉar tia pano en la tuta urbo ne estis. La almozulo rakontis al li de kie li ricevis kaj kondukis lin en lian propran hejmon. Li insultante la almozulon, eniris en domon. Enirinte li demandis la edziŝon, ĉu ŝi donis al la almozulo panon? Ŝi respondis, ke ŝi donis al sia filino kaj ŝi donis al la almozulo; tiam li kolerinte detranĉis la dekstran brakon de sia filino. Pasis malmulte da tempo kaj la riĉulo ne havis panon por manĝi, ĉar li perdis ĉiujn siajn proprajojn, kaj li havis nenion. Tiam li ordonis al sia filino iri almozi. Ŝi ekridante eliris el domo; ĉar ŝi neniam eliris el domo, ŝi ne sciis, kien iri. Ŝi iris kaj pensis pri sia malfeliĉeco. Intre ĉirkaŭ du horoj, ŝi venis en Bazaron, kaj ĉi tie ŝi vidis unu magazenon, kaj decidis peti almozon! Sed ŝi ne povis peti kaj staris antaŭ la magazeno. En ĉi tiu minuto la mas-

\*) Bagdado estas unu el ĉefaj urboj de antikva Assorujo.

tro de la magazeno ekvidis ŝin, kaj vidante ke ŝi estas senkulpa, li decidis edziĝi kun ŝi. Li alvokis ŝin en sian magazinon kaj vokinte Ĵmamon, li edziĝis kun ŝi. Post la edziĝo ili eniris en manĝoĉambron kaj komencis manĝi; sed ŝi tri foje volis komenci manĝi kaj preni manĝaĵon per sia dekstra mano. Sed ŝi timis, ke li, ekvidinte ŝian maldekstran manon, forpelos ŝin, kaj ŝi je la la kvara fojo, dirinte Bismillah\*) etendis sian manon, kaj ŝia mano estis sana (per Dia volo ŝia mano saniĝis). Tiam la edzo demandis ŝin kial ŝi tri foje volis etendi la manon kaj ne decidis? Responde al li ŝi rakontis la aventurojn de sia tuta vivo. Tiam li diris al ŝi ke, ĉi tiu magazeno estas lia propraĵo kaj li aĉetis de ŝia patro. Moralo: forpelu nenium, se vi povas doni malmulte da io.

El tata lingvo esperantigis

L. I. CHELEBI



### HUMORAĴOJ

La instruisto.—Ivanov, kion vi farus, se vi trovus sur la strato kvin spesmilojn?

La lernanto.—Mi serĉus, ĉu ne estas ankoraŭ ie mono!...

\*\*\*

—Donu, sinjoro, al mi ŝtomon de ĉiela koloro.

—Jen, sinjorino...

—Sed ĝi ja estas griza...

—Jes, kaj ĝi tute similas al nia peterburga ĉielo.

\*\*\*

—Mi volus naskiĝi en la tempoj de Aleksandro Macedona,—diras gimnaziano de la tria klaso.

—Kial?—demandas al li la patro.

—Ĉar tiam mi ne devus lerni el la historio ĉion, kio okazis post li.

\*\*\*

Vartistino.—Nu, Manjo, estu saĝulino. Vi havas nun novan malgrandan frateton.

Manjo (plorante).—Mi volus havi kapreton.

\*\*\*

La juĝisto (al la policano).—Kial vi permesis forkuri la juĝaton? Kial vi lin ne arestis?

La policano.—Kiel mi povus lin aresti, via moŝto? En unu mano mi havis sabron, kaj en la alia—revolveron.

Esperantigis V. SIRUNJAN.

\*\*\*

Unu fojon ĉirkaŭ la manĝotablo sidis edzo, edzino kaj ilia malgranda knabino. La lasta, vidante, ke la patrino enŝutas pipron en supon, diris:—Panjo, donu ankaŭ al mi pipron!

„Nun ankaŭ la malgranda porkino ekvolvis pipron, ekkriis la patrino.

—Kial do vi manĝas? demandis la knabino.

„Mi?... mi estas granda...

Esperantigis L. Oganezov.

\*\*\*

Generalo donacis unu oranĝon al soldato. La lasta prenis ĝin kaj rigardis.

—Kion vi ricevis? demandis la generalo.

Limoŝadon, via Moŝto, respondis la soldato.

(Fakto).

Sinjoro oscodis.

\*) Bismillah—nomante Dion.

—Ha, sinjoro, mi timas, ke vi glutos min!—ekkriis sinjorino.

—Pardonu, sinjorino, bedaŭrinde mi ne manĝas porkaĵojn, diris sinjoro.



## BIBLIOGRAFIO

**La Karavano** Wilhelm Hauff. El germana lingvo tradukis J. W. Eggleton. V. London. Brita Esperantista Asocio. 133—136, High Holborn. W. C. Prezo Sm. 0, 50.

Tiu ĉi libro enhavas ses fabelojn de la fama germana poeto Wilhelm Hauff. La fabeloj estas interesplenaj kaj tradukitaj per bela esperanta stilo. Ni povas rekomendi tiun ĉi libron al niaj samidenoj, kiel belan esperantan tradukverkon.

V. S.

### La unua numero de Esperanto en Voroneĵ.

Niaj fervoraj junaj samideanoj—lernantoj de 1-a vira gimnazio en Voroneĵ, eldonis kolekton da siaj originalkaj tradukverketoj. La stilo de tiu ĉi verkareto estas bela, kio montras, ke la baloro de nia samideano S-ro V. Zamjatin tute ne restis senfrukta, sed kontraŭe, enradikigis nian lingvon kaj ĝi nun progresas sukcesplene. Daŭrigu do la laboron honestan, karaj junaj kunlaborantoj ja afero bone komencita havos ĉiam bonan rezulton! Lumero iĝos lumo.

V. S.

**ЖУРНАЛЪ УЧАЩИХСЯ** № 1 1910 г. Воронежъ. Редакторы: Б. Кляжинскій и М. Ширвиндтъ.

Съ радостью встречаемъ «Журналъ учащихся», дающий просторъ всесторонней дѣятельности учащихся города Воронежа. Инициаторы этого дѣла по-

ставили себѣ цѣлью „пойти навстрѣчу сближенію учащихся, создать дѣло, про которое и гимназистъ, и реалистъ, и гимназистка могутъ сказать: „наше дѣло“. Къ журналу приложень эсперантскій сборникъ учащихся Воронежа. Искренно привѣтствуемъ.

В. С.

## RICEVITAJ LIBROJ.

Petit Cours primaire d' Esperanto en 50 leçon graduées, par M. M. D. Bonnehonet A. Rosiaux, 1 ilustrita volumo bindita, in 16, 127-paĝa. Fr. 1, 20.

2) Dictionnaire complet Esperanto-Français, par Grosjean-Maupin. 1 volumo bindita 238-paĝa. Fr. 2.—

La question de la langue auxiliaire internationale, par Gustave Ganthero 1 volumo in 16, 314-paĝa. Fr. 3, 50.

Librejo Hachette et C-ie, 79. boulevard Saint-Germain. Paris.

4) Esperanta Biblioteko Internacia, № 13. Bulgaraj Rakontoj de Ivan Vazov trad. At. D. Atanasov, Berlin Esperanto verlag Moller et Borel, prezo 0, 10 Sm.

La Aventuroj de Alicio en Mirlando de Lewis Carroll, tradukita de de E. L. Keasney, M. A. 1910 j. London.

## Esperantista Gazetaro:

- 1) German-Aŭstria Esperantisto № 10.
- 2) Tutmonda Espero № 33.
- 3) Internacia Socia Revuo № 10.
- 4) La Revuo № 2.
- 5) Germana Esperantisto № 10, 11.
- 6) Kataluna Esperantisto № 6—7.
- 7) Verda Stelo № 9—10.
- 8) La Holanda Pioniro № 1, 2.
- 9) La Simbolo № 8.

16) La Ondo de Esperanto № 9. 10.

11) La Spiritulo 4.

La du Steloj, oficiala monata organo de Ĉilia Esperantista Asocio № 3. Jarabono: \$m 1. 00. Adreso: Casilla 728. — Santiago Chile.

La du steloj, oficiala monata organo de Ĉilia Esperantista Asocio № 3-4.

— Abonprezo. \$m 1. 00. Adreso: Casilla 728. — Santiago Chile.

Juneco, oficiala organo de la Franca Federacio de la junaj esperantistoj № 9 (cirkonlato). Jarabono: 4 fr.

Adreso: Paris, 62, Boulevard Raspail 152.

Laborista Esperantisto, monata organo de la Ĝenerala Hago Esperanta Laborista Klubo. Jarabono: 0. 60 fr. Adreso: R. Coomans, Falckstraat, 175. Hago (Nederlando).

## Respondoj

Бакы, А. Микиртумову. За гадету ушлатите и, только постъ можете говорить обь аккуратности. До сихъ поръ отъ Васъ подшненая плата не получена. Тоже самое передайте Вашему ба-лаханскому знакомому.

ԾՈՍԿՈՒՑ. Հայկ Սարգսեանին. Կարձնայ ուղից 35 բարիք բարք ձեռնակը հարուստ:

Batum. — S. Mkrtčjan. La redakcio petas Vin respondi.

Van. — G. Gazazjan. Torendor Knrage, Vin atendas amo... Skribu do pri esperantismo en armena Turkujo.

Erzerum. — V. Tiracjan. Legu la respondon al G. Gazazjan.

Redaktoro: Eldoniŝto

H. Ter-Astvacatjanc

## Internacia Medico

Kiel oficiala organo de la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio „TEKA“ aperas ĉiun monata scienca tre grava ĵurnalo sub la estropa titolo: Internacia redaktistaro gvidas la ĉiok mōdernaĵ ĵurnalon: legindan — en unua loko — ne pro lingvaj interesoj, sed pro ĝia enhavo. Precipe la internaciaĵoj en la medicino estas pritraktataj. TEKA-anoj ricevas la ĵurnalon seppage: aliaj abonoj ĵare 3 \$: unu — numero — 0.300 \$: specimeno je respond-kuponō. „Internacia Medico“ estas tregevalora ankaŭ por la propagando. Tial la eldonejo liveros ĝin al esperantaj grupoj (amen nur al grupoj) la tutan ĵaron por nur 1 (unu) \$ (anstataŭigo de la forsendelspezoj), se ili mandos & pagos ĝin dum 15 tagoj post apero de tiu sciigo.

Adreso: INT. RNACIA MEDICINO  
Kätzscherbroda-Dresden (Germanio)

## Анонсој

Մի քանի օրից լինայ յոյս կը տեսնիք

ՔԵՐՈՒԿԱՆՈՒԹԻՒՆ

ԷՍԿԵՐԱՆՏՈ ԼԵՂՈՒՆ

ԳԻՆԸ 2 ԿՈՊ.

50 օր. — 80 կ. — 100 օր. 1 ր. 60 կ. — 200 օր. 3. ր. Գիմիկ թերթիս խմբագրութեան: ճանապարհամար միզ կրուք:

Въ редакцій журналу „Кавказскій  
Есперантистъ“. Елизаветинская ул.  
№ 17, продаются следующие книги:

- 1. Kato en botoj, tr. de V. Sirun. 10 k.
- 2. Humilo kaj kato . . . . . 10 k.
- 3. Rondaj Dioj . . . . . 3 k.
- 4. Ekzercar. Esperanta, de V. S. . . . . 5 k.
- 5. Nimo, tr. de V. Gogitidze . . . . . 3 k.
- 6. Գանձերը Էսպերանտո լեզուի  
ըն շ. Տիրամատարեանի . . . . . 25 k.
- 7. Բանարան Էսպերանտո-նոյն-  
րէն շ. Տ. Ստամատարեանի 50 k.
- 8. Полный учебникъ Эсперан-  
то, В. Сирунянъ . . . . . 12 r.
- 9. Esperanto Helplibreto . . . . . 8 k.
- 10. Էսպերանտո միջազգային լե-  
զուն, Լ. Օհանջանեանի . . . . . 3 k.
- 11. Esper. Legolibro de A. Fiŝer 30 k.
- 12. I. Turgenjev. Kanto de trimum-  
fanta amo, tr. A. Fiŝer . . . . . 25 k.
- 13. . . . . Anjo (Acan) tr. de  
A. Fiŝer kaj V. Zamjatin . . . . . 25 k.
- 14. Poŝtkartoj kun portreto de L.  
Zamenhof po 2 k. 100 eks. 1 r. 70 k

Прод продаются также 10 экз. вытиснен  
20 экз. 10 экз. Переселенцы на степях южно-  
казахстана.

Черезъ редакцій можно получить  
еще следующие книги:

- 1. L. L. Zamenhof. Fundamen-  
to de Esperanto (gramatiko,  
ekzercaro, unives, vortaro) 80 k.
- 2. Fundamenta krestomatio, de  
la lingvo Esperanto . . . . . 1 r. 40 k.
- 3. La Revizoro (de Gogol) . . . . . 60 k.
- 4. Maria de Ojuboŝko . . . . . 1 r. 40 k.

Baldaŭ aperos  
la 2-a eldono de  
**RUGA ĈAPETO**  
kaj  
**Kato en Botoj**  
(Fabeloj por infanoj)

L O B U S E D U A

**ԱԼԹՈՒՆ ԴԵՐԷՍԻ**  
ԳՆՈՐ

ՄԸ ԴԻՇԵՐ ԲԱՂԸԻ ԲՆԵՑՈՒՐ

Գրողը, զինք 20 է. Գանձարով 25 լ  
զեկը. Կանկարչոյնին ինչպե՞ս զտեկ  
Տփիլիս «Գուսաներկը» և «Կենարան-  
կան» գրափոճաւանոյնը կամ Տփիլիս

**ՔԱՆԴՈՅԵԱՆ ԵԿԵՂԵՑՆԻ**  
Գ. ՇԷՐԵՆԻՆԻ

Тифлисъ. Тацкоевская церковь. Г.  
Шеренинъ.

L O B U S E D U A

ԳՐԱՆԵՐԿՈՒՆ ԳՐԱԳԵՐ

Գ. ԱՅՅՄԱՆ

**ՀԱՆԳՈՑԻ**

**ԸՈՒԾՈՒՄԸ**

Թարգմ. Օ. Գեղեցեանի

ԳԲԵՆ Է 3 ԿՈՊ.

Գրվել է 1914 թ.

Գրվել էր Տփիլիս Եлизаветинская 114.  
Օ. Գեղեցեանին

Estas malfermita por 1911 jaro abono de la gazeto  
**„LA ONDO DE ESPERANTO“**

(laŭ la adreso: 26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo).

Jara abonpago 2 rubl. (2,120 sm.)

Dum la 3-a jaro de sia ekzistado tiu ĉi sola ĉiumonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 16-paĝaj numeroj, la librojn:

1) **A. Rivier. EN BUSUJO PER ESPERANTO.**

(130-paĝa originala priskribo de peresperanta vojaĝo de la Alĝera aŭtoro en Rusujo).

2) **V. Devjatnin. PLENA VERKARO.**

3-a vol. 140-paĝa libro

Apartaj kajeroj de la ĵurn. 15 sd., de la verko de Rivier 64 sd., Devjatnin 65 sd.

**Вышла изъ печати книга**

# **СЧЕТОВОДСТВО**

**ОБЩЕСТВЪ ВЗАИМНАГО КРЕДИТА.**

**Цѣна 2 р. 50 к. безъ пересылки.**

Составилъ **А. Арумовъ**, основатель Второго Тифлискаго О-ва  
 Взаимнаго Кредита.

Продаются; 1) у автора: Тифлисъ, Закавказское Отдѣленіе Крестьян-  
 скаго Поземельнаго Банка и 2) въ книгоиздательствѣ и книжномъ складѣ  
 „Коммерческая Литература“ С. Петербургъ, Екатериногофскій пр. 8.

# КНИГИ

для изученія языка

## „ЭСПЕРАНТО“

учебники, самоучители, словари — русско-эсперантскіе, эсперанто-русскіе, книги для упражненія и чтенія и зеленые значки продают-

ся въ О-вѣ „Эсперанто“ при Тифлисской I мужск. гимназіи по воскресеньямъ отъ 10<sup>1</sup>/<sub>2</sub>—12 ч. дня и по средамъ отъ 7 ч.—9 ч. веч.

## „Майкопская Газета“

ежедневная, литературно-политическая и общественно-экономическая.

Годъ изданія 1-й (съ 1910 г.) въ г. Майкопѣ, Куб. обл.

Выходитъ по программѣ столичныхъ газетъ, особое вниманіе удѣляя вопросамъ промышленнымъ и финансовымъ.

Экономическіе интересы Кубанской области и Майкопской нефтепромышленности будутъ обслуживаться въ „Майкопской газетѣ“ всесторонне.

Собственные корреспонденты во многихъ городахъ Россіи и заграницей. Специальные корреспонденты въ Лондонѣ и Берлинѣ.

**Подписная цѣна съ іюля до конца года 3 р. Отдѣльный №—3 к.**

### Такса для объявленій:

На 1-й страницѣ 1 строка петита—20 к. На 4-й страницѣ 1 строка петита—10 к. Иногороднія объявленія—30 и 20 коп. строка. Годовымъ и мѣсячнымъ—скидка 50%. Объявленія и предложенія труда по 25 коп.—5 строкъ.

Пріемъ подлинки и объявленій производится въ книжномъ магазинѣ Марѣева, Соборная ул. Туда же можно пересылать и передавать все письма, сообщенія и замѣтки для газеты.

Все переговоры по дѣламъ редакціи, временно, въ магазинѣ Марѣева отъ 11 до 12 ч. дня.

# Типографія „ЭСПЕРАНТО“

Елизаветинская ул. № 17.

Принимаетъ всевозможные типографскіе заказы на языкахъ

Эсперанто, русскомъ, французскомъ, армянскомъ, грузинскомъ и др.

Печатается: газеты, брошюры, книги, бланки, детушки, прейсъ-куранты, этикетки, и т. д.

Визитныя карточки по самой дешевой цѣнѣ.

Работы исполняются скоро, аккуратно и по самымъ умереннымъ цѣнамъ.

Контора типографіи открыта отъ 8 ч. утра до 8 ч. вечера.

# ՏՊԱԴՐԱՆ „ԷՍՊԵՐԱՆՏՈ“

Ելիզաւետինեայ փողոց, № 17.

Ընդունում է ամեն տեսակ պատվերներ

ԷՍՊԵՐԱՆՏՈ՝ ՎՐՅԱՐԷՆ, ԻՍՍՐԷՆ, ԳՐԵՆՍԵՐԷՆ, ՎՐԵՆՍԵՐԷՆ

ԵՒ ԱՅԼ ԼԵԶՈՒՆԵՐԻՈՎ

ՏՊԱԳՐՈՒՄ է լատիներէ, գրեթէ, արաբներէ, արմեններէ, իտալերէ, յայտարարութիւններ, պակ-կառմաններ, Լաիկներէ, յաշիկներ եւ:

ԱՅՅԵՏՈՒՄԵՐԷՆ ՈՄԵՆԱՅԵՐԵՏՈՒ ՎԵՆԻՈՎ:

Պատուէրները կատարում են **ԱՐԱՎ, ՃԻՇՏ, ՄԱԲՈՐ** և ամենա-  
չափար գինով:

Տպարանի գրասենակը բաց է սու. 8 ժամ. մինչև եր. 8 ժամ:

# სტამბა „მსპერანტო“

ელიზავეტინსკაია ქუჩა, № 17.

იღებს ყველა გვარ ზაკაზებს მსპერანტო, რუსულ, ქართულ, სომ-  
ხურ, შრანულ, ო სხვა ენებზედ.

ბეჭდავს გაზეთებს, წიგნებს, ბროშურებს, ბლანკებს, ლეტუჩკებს, პრეს-  
კურანტებს, ეტიკეტებს, ანგარიშებს ო სხ.

ვიზიტნი კარტიჩები ხელმისაწვდენ ფასებშია.

ზაკაზები სრულდება მსწრაფად და სუფთად დაკლებულ ფასებში.

კანტორა ღიაა დილის 8-დან საღამოს 8 საათამდე.